Agadraporto de la sekretario por la 2017ª jaro

Februare (14): Okazis, en la lernejo *Francesco Rismondo*, renkontiĝo kun la gelernantoj partoprenintaj en la 3ª Pentrokonkurso *Angelo Soranzo*. En tiu okazo estis prezentitaj Esperanto kaj la agado de TEA.
Septembre (28-30): Okaze de la 110ª fondodatreveno de la E-societo de Rijeka, TEA prezentis la ekspozicion ESPERANTO KAJ FILATELO, en la ejoj de Circolo di Cultura Italiano, centre de la urbo.
Oktobre (13-14; 20-21; 24-27): Okazis "Seminario pri internacia komunikado" subvenciita de la Volontula Servo FVG, kies celo estis alfronti la problemon de la internacia komunikado, startante de prezentado de la aktuala situacio kaj de la diversaj provoj solvi ĉi problemon, ĝis alveni al la lingva projekto de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Krom la elstaraj prelegoj de profesoro Davide Astori, Universitato de Parma, okazis ankaŭ leciono fare de Manuela Oliva pri la diversaj teknikoj por plibonigi la lernado-sistemon, pli facilan enmemorigon kaj rapidan legadon, precipe rilate al studado de aliaj lingvoj. Grupo el junaj torinanoj per rapida kurso klarigis koncize la strukturon de Esperanto. La tuto glate kaj sukcese disvolviĝis kaj vidis la partoprenon de ĉirkaŭ dudeko da personoj.
Decembro (11): Enkadre de la Projekto "Mia Lernejo kaj la volontulado", celanta eduki la novajn generaciojn kompreni la bazajn sociajn valorojn, kiaj estas la solidareco, altruismo kaj vivrespondeco, kaj kunlabore kun la Asocio *Anteas* pri civila volontulado, ni prezentis Esperanton kaj nian asocion al kvindeko da lernantoj el la Instituto por Enkonduko en laborkampon (avviamento al lavoro) – 'Lernejo IAL' en strato *Pondares*.

Alirprogramoj de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 10 elsendoj pri diversaj temoj.

Elda Doerfler